

Jam 10 jarojn:

Le Monde Diplomatique en Esperanto

IEI donis premion al la traduk-teamo

En grandurbaj kioskoj kaj flughavenoj, internacia elradiado sin montras per diverslingvaj ĵurnaloj, semajnaj gazetoj kiel *Newsweek*, *The Economist*, *Der Spiegel*, *El Mundo*, kaj monataj gazetoj kiel *Le Monde Diplomatique*. De la tie pasantaj esperantistoj nur malmultoj konscias, ke tiu altnivela franca gazeto (LMD) ekzistas ankaŭ en perfekta Esperanta traduko, ĉiumonate facile kaj senpage alirebla en la reto (<http://eo.mondediplo.com>).

Se rigardi iom malantaŭen, la 21-a jarcento por Esperanto komenciĝis kun admirinda laborprojekto. Ekde la fino de 2001, teamo de kapablaj volontul-tradukistoj dum 10 jaroj seninterrompe realigis ĉiumonatan esperantigon de 7-8 longaj (meze 1800-vortaj) artikoloj, ĝis nun jam pli ol 1 500 000 vortoj da teksto entute. Temas pri tekstoj, kiuj pritraktas aktualajn temojn, verkitajn de profesiaj ĵurnalistoj, plej ofte temojn de internacia graveco, sur la terenoj de politiko, ekonomio kaj socio, fojfoje ankaŭ pri klimatsanĝo kaj teĥnologio.

Ĉi tiu mondpolitika Esperanta teksttrezoro havas grandan signifon. Unue ĉar ĝi povas allogi novajn uzantojn de nia lingvo. Hodiaŭ, ekzemple, studentoj kiuj hazarde aŭdas pri ĝi, ne plu rilatigas ĝin tuj al la 'eksmoda hobbio' de sia avo, kiel kutime estis la reago en la lasta duono de la pasinta jarcento. Nuntempe, ili serĉas scivoleme en la reto, kie kun bonŝanco ili malkovros la LMD-retejon kun la arĥivo de 850 artikoloj pri mondpolitikaj aferoj, ĉiuj en tiu 'artefarita' lingvo (kaj neniu el la artikoloj temas pri Esperanto mem). Se rigardi tra tiu tekst-amaso, tio kio donos al interesiĝanto pli da sento por la 'nova lingvo', estas la alirebleco de paralelaj tekstoj: la franca originalo, sed ankaŭ la pli ol 20 alilingvaj versioj (!) en kiujn LMD estas ĉiumonate tradukita, kaj kiuj aperas rete aŭ surpapere. Aldone al la nuna diverseco de lingva edukado kaj instrumentadoj en Esperantio, la ekzisto de paralela korpuso de aktualaj tekstoj povas kontribui al la lerneblo por progresantaj aŭ eĉ komencantaj E-legantoj, certe al tiuj kiuj interesiĝas kaj pri la temo de la tekstoj kaj pri la por ili nova lingvo. Tial IEI (la Internacia Esperanto-Instituto en Hago) proponis la uzon de LMD ĉe kursoj en la ĉi-jara projekto 'Esperanto125', lanĉita de ILEI.

Indas ankaŭ citi ĉi tie eldiron de Jose Antonio Vergara (afiŝitan 2010-09-27 en *Libera Folio*): "la ekzisto de Esperanto kiel homa realaĵo multon ŝuldas al la inspira fakto ke iuj persiste tradukis

literaturaĵojn en ĝin, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj". Krome: kion vi respondus se iu konato (ne-esperantisto) dirus al vi: "Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?" aŭ "Ĉu eblas en Esperanto paroli pri la kreditkrizo?" Nun la ĝusta reago iĝas simpla: malfermu vian tekokomputilon kaj montru la retejon *eo.mondediplo.com*. Pli serioze kompreneble estas, se tiaj demandoj estas farataj sur registara nivelo, kiel okazis ĉe la EU-Komisiono antaŭ dek jaroj (vidu la revuon *Esperanto* de februaro 2004, en kiu mi jam atentigis pri tio, kaj substrekis la gravecon de la tradukprojekto LMD, por atingi estontan agnoskon de Esperanto en eŭropaj tradukservoj).

Tamen tre mirige estas, ke la LMD-laborego tra la pasintaj jaroj ricevis tiel malmulte da laŭdo aŭ atento. Ĉu eble la kaŭzo de tiu preskaŭ-neglekto estas, ke tekstoj de pli ol 300 literoj (aŭ eĉ 140 signoj) ne plu estas legataj en nia epoko? La kaŭzo certe ne estas la kvalito de la LMD-tradukoj, kiuj simple estas bonaj: sufiĉe precizaj kaj bone legeblaj. Ankaŭ la kvanto de eraraj tekstvortoj estas malalta: ekz. 1,5 promilo en 2008, kaj nur 1 promilo en 2011. Plejofte malpli konataj propraj nomoj kaj specifaj netradukeblaj lokaj nocioj estas klarigitaj inter krampoj aŭ per piednoto. Krome, certaj vortoj estas alklakeblaj, post kio aperas klarigo en Vikipedio. Ankaŭ interagado eblas: legantoj povas per entajpita teksto tuj reagi al artikolo. La tuta retejo *eo.mondediplo.com*, kune kun sia arĥivo, estas afable organizita.

Internacia Esperanto-Instituto en Hago (*www.iei.nl*) nun decidis doni premion de 2 000 eŭroj al la LMD-tradukteamo, kun Jeanne-Marie Cash kaj Vilhelmo Lutermano kiel ĝiaj ĉeftradukantoj, post jardeko de laŭdinda laboro.

Toon Witkam